Antaŭparolo

La sikul-hungara rovaŝo ('noĉoskribo') estas parto de la universala kulturo de la homaro, spirita produktaĵo de praa civilizacio, kiun kreis hungaroj kaj iliaj prauloj en la historiaj epokoj. Ĝiaj deveno, ekesto kaj parenceco kun aliaj skribsistemoj estas ĝis nun temo de sciencaj esploroj. En la rondoj de esploristoj kaj rovaŝistoj ekzistas amaso da teorioj pri tiuj demandoj. Ekskludante ĉiujn dubojn la fakto estas pruvita per objektaj memoraĵoj, ke la hungaroj en la 9a jarcento en sia propra lingvo vaste uzis rovaŝon, kiu permesas la konkludon, ke rovaŝo estis uzata ekde pluraj jarcentoj pli frue.

Ankaŭ en la Hungara Reĝlando simile al multaj landoj en Eŭropo ekde la 9-a jarcento la latinaj lingvo kaj literoj iĝis karakterizaj en la oficialaj ŝtatdirekta kaj eklezia dokumentadoj. Spite al tio rovaŝo ĝis nun restis daŭre uzata en iuj partoj de la hungara lingvoareo, kaj inter la simplaj paŝtistoj, sikulaj lignoskulptistoj, kaj inter la nobeloj, respektive pastroj, eĉ en certaj periodoj ĝi servis ankaŭ en la kriptografio. Rovaŝo ne nur transvivis la ŝtormojn de la mezepoka kaj novepoka historio, sed dume ĝi senĉese evoluis, kaj en jardekoj de la ĵuspasinto ĝi atingante senprecedencan popularecon akomodiĝis ankaŭ al la pretendoj de la nuntempo, kiam aperas libroj, gazetoj kaj hejmpaĝoj en la sikul-hungara rovaŝo, ĝin aplikas bildoj, skulptaĵoj, dizajnaj solvoj kaj publikspacaj surskriboj, respektive dank' al elokventaj instruistoj dekmiloj da gejunuloj ellernas la nacian skribon.

La de jaro al jaro vastiĝanta komprenantaro kaj ŝatantaro de la sikul-hungara rovaŝo ĝis nun atingis la grandecon de plurcentmiloj, kio necesigis establi la kondiĉojn de la moderna aplikado de la nacia skribsitemo. Partoj de tiu ĉi procezo estas la laŭforma unuecigo, la modernigo de la skribreguloj, respektive la teĥnika normigo, kiujn realigis rovaŝistoj kadre de komunuma kreado – tutsame, kiel tion faris ankaŭ la paruloj dum la konservado kaj evoluigo de la skribo. La jena libro prezentas stacion de tiu ĉi tradicikonserva, krea laboro: la 4-an de oktobro 2008. la komunumo de la sikul-hungaraj rovaŝistoj kunvenis en urbo Gödöllő al konsultiĝo Vivanta Rovaŝo por levi la nacian skribsistemon de la hungare parolantoj en la mondon de komputado.

El la vivantaj kaj efektive uzataj skribsistemoj en Eŭropo laste nur la sikul-hungara rovaŝo ne estas parto de la normo UNICODE ebliganta la ĝeneralan aplikadon en la komputado, tial la organiziĝanta komunumo de rovaŝistoj interrete kaj realvive sub la gvido de D-ro Gábor Hosszú oficiale transdonis la normoprojekton N 3527 konsulteblan ankaŭ ĉi-libre. Estas firma celo de la komunumo pere de kiel eble plej vasta konkordo kiel eble plej rapide realigi la ennormigon, al kio ĉi-voje estas petata la subteno ankaŭ de la Kara Leganto.

La aŭtoroj de la libro opinias, ke la sikul-hungara rovaŝo estas mirinda trezoro de la prauloj, mistera heredaĵo por la ĉiamaj posteuloj, kiun kun decaj estimo kaj honesto modernigite pludoni estas devo. Tio estas aktuala precipe nuntempe, ja la pensaro kaj bildaro de la nacia skribsistemo, respektive pere de siaj organikaj kontaktoj kun la hungara lingvo kaj kun preskaŭ ĉiuj kampoj de la hungara kulturo povas esti ŝlosilo al la tiom sopirata hungara spirita renoviĝo.

© 2008. Dr. Hosszú Gábor - Rumi Tamás - Sípos László: Az élő rovás - Nemzeti írásunk a szabványosítás útján. Minden jog fenntartva. All rights reserved.